

SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc - Roussillon »

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN ☎ 34.22.18

JARA ABONO : 10 F

C.C.P. 956-28 Montpellier

N° 84

3-a Kvaronjaro 1982



Rememorante la karan amikinon Maria Frus-Kina

Kruela sortobato trafis nian amikon Roberto FRUS, Direktoron-Peranton de nia revuo "Sudfrancia Stelo".

La 25-an de septembro, post mallonga kaj terura malsano, forpasis lia fratino, S-ino Maria KING-FRUS, en sia 43-jaro. Ŝi lasas du knabinetojn : Leonora -5-jara- kaj Debora -3-jara-. Ŝiaj cindroj estis translokitaj en ŝia denaska urbeĝo, TORINO.

Antaŭ sia edziĝo, Maria FRUS estis sekretariino dum 7 jaroj de F.E.I. (Itala Esperanto-Federacio) kie ŝi laboris plentempe. Poste, je 1972 kaj ĝis 1975, ŝi estis oficistino en la sidejo de U.E.A., en ROTTERDAM. Tie, ŝi konis la estrojn de nia neŭtrala movado, S-roj Ivo LAPENNA kaj Humphrey TONKIN, perfektigante en nia helpa lingvo, eklernante la funkciadon kaj la malfacilaĵojn de la instancoj.

Ŝi vizitis ofte nian regionon - jam en 1968, kun la itala karavano al la U.K. en MADRIDO-. Ŝi renkontis ĉiujn niajn samgrupanojn, kaj eĉ S-anĝOLLECH-WALTER. En 1975, ŝi kunlaboris kun D-ro Georges SALAN pri la traduko de lia verko rilate al lia ĉortbaraktado kiel deportito, nome "LA NUDA VERO". Nia karmemora Prezidanto ĉeestis la edziniĝon de Maria kun Geoffrey KING, en Torino.

En Junio 1980, nia S-ano H. Jannez pasigis kelkajn tagojn en ŝia familio kie li akompanis ŝian fraton Roberto.

La Nima Grupo, nome de la Federacio Langvedoko-Rusiljono, partoprenas la aflikton de la familioj KING kaj FRUS, kaj kondolencas kortuŝe nian kamarinon Roberto FRUS kiu montris multe de kuraĝo dum tiuj funebraj tagoj.

- La komitato de la bulteno -

Lastmomente

EL C A R C A S S O N N E, nia vigla S-ano sendis al ni du fotokopiojn de artikoloj aprintaj en la regiona gazeto "MIDI - LIBRE" sub la titolo : 20 ans après, ils remettent ça : La nouvelle jeunesse des esperantistes audois. Temas pri la laŭdindaj klopodoj de nia amiko pri la revivigado de nia movado kun la helpo de kelkaj samurbanoj, S-ino Salvayre, S-ro Benit. Kursoj okazas en la F.E.P. (Kultura Domo) de Grazaillies. Ankaŭ "La DÉPÊCHE" raportis pri tiu ago, "6.000.000 le parlent"...! "Le Foyer de Grazaillies se met à l'Esperanto..."? Foto ilustras ĉiun el tiuj artikoloj.

KONCIZA PROTOKOLO PRI NIA ĀUTUNA LABORKUNSIDO EN SETE (17.10.1982)

Venis trideko da homoj, el kiuj 10 el la 16 federaciaj komitatanoj, ĉe la ĉiam gastema Centre Familial du Lazaret.

Je la 10-a, S-ro LLECH-WALTER (R.L.W.) malfermas la kunvenon kaj konfirmas sian deziron, pro la aĝo, forlasi la prezidantan postenon.

S-ro Frédéric MAURIN (F.M.) estos kandidato se aprobita estos lia programo.

Unue, li sin prezentas : 22-jara fraŭlo, lerninta E-on en Clermont-Ferrand, nun studento pri matematiko en Montpellier.

Lia mandato estu tempodaŭre sufiĉa por bone labori sed ne dumviva.

La du angulŝtonoj de lia programo estu : strukturigo kaj dinamiko.

Intervenis R.L.W., D-ino VIERNE (Y.V.), S-ro HENIN (J.H.), S-ro BORQUE (C.B.), S-ino MOUNIER (C.M.), kaj Jean AMOUROUX (J.A.)

Surbaze de lia programo, la komitatanoj elektas F.M. kiel federacian Prezidanton per 8 aproboj kaj 2 sindetenoj.

F.M. tiam iras al la prezidanta sidloko, gratulas al R.L.W. kaj proponas ke R.L.W. estu honora prezidanto de la Federacio, kio estas unuanime aprobita.

Kiel Vic-Prezidantino restas Y.V.; kiel kasistino S-ino NEGRON (L.N.) kaj J.A. kiel sekretario.

J.H. fariĝas estrarano kun specifaj taskoj apud F.M. pri strukturigo kaj dinamiko.

Tiel finiĝis la unua parto de la kunveno.

Post la komuna tagmanĝo, ni rekuniĝis je la 14-a.

Nia venontjara federacia kongreso okazos en CARCASSONNE. Pro la urbes-traraj balotoj, kies datoj ne estas ankoraŭ konataj, ne eblas decidi pri la dato de nia kongreso : ĉu 6-a, ĉu la 13-a, ĉu la 20-a de marto ? (1)

Ĉar ĉiam deficitata, ŝajne necesas reprikonsideri "Sudfrancia Stelo"-n : ĝusta celo, rimedoj kaj homfortoj.

S-ro FRUS (R.F.) daŭre ĝin eldonos kaj L.N. sin proponas por skribi la adresojn sur la banderolojn.

La tekstoj devas estis sendataj al S-ro JANNEZ (H.J.), 12, Rue Mozart 30000 NIMES - Tel. (66) 64 19 74 .

La abonkosto por 1983 daŭre estas 10,00 F .

En 1983 finiĝos la mandato de 2 komitatanoj de U.E.F., anoj de nia Federacio : Y.V. kaj J.A. Ĉar J.A. ne deziras rekandidatiĝi, nia federacia komitato subtenas la kandidatiĝon de Y.V. kaj J.H.

J.H. parolas pri intencata organizo de pertrajna karavano al la venontjara U.K. en BUDAPESTO kaj kolekto de ekspoziciotaj murpaneloj kadre de la "jaro pri komunikado" en 1983. Pri tiuj planoj li detale skribos al J.A. por diskonigo de la informoj alla grupoj.

La kunveno finiĝis je la 16 h 30 . Raportis : J.A.

(1) La datoj pri tiu baloto estos la 6-a kaj 13-a de marto 1983

Lastmomente

En la bulteno de ESPERANTO CENTRO, en TORINO, S-ano F. PENNACCHIETTI omaĝas S-inon FRUS-KING, sia eks-grupanino kiu aniĝis la italan movadon komence de la 60-aj jaroj, laborinta kiel dungitino ĉe la sekretariejo de FEI je 1964. Ŝi konservis intimajn rilatojn kun la asocio, kiun ŝi ĉiam vizitis okaze de siaj revenoj al Torino. Ŝia londona hejmo varme gastigis kelkajn el ŝiaj ĉi-urbaj amikoj. Dimanĉon 24.10.82, trideka tago post ŝia morto, okazis meso por ĉiuj gesamideanoj, en la sama preĝejo kiu ŝin vidis feliĉa novedzino.

P E R P I G N A N : LISTO de la SUKCESINTOJ de la EKZAMENOJ en nia
REGIONA FEDERACIO (Sciigo de Franca Esperanto-Instituto)

Atesto pri Lernado : MACKER R. (S.B.) kaj RAÏ Kazem

ATESTO PRI PRAKTIKA LERNADO :

CALLET Monique (B) FENOY Sylviane (S.B.)
DEFOLY Adrien (B) HUBERSON Josette (S.B.)
MARTINEZ Pierre (S.B.)

Gratuloj al la sukcesintoj kaj iliaj instruistoj aŭ instruantoj. La F.E.I. atendas multe pli da kandidatoj en 1983 !

M O N T P E L L I E R : Denove plej sukcese estis organizita la Internacia Semajno de Esperanto en SETE, Le Lazaret.

51 partoprenantoj inter kiuj S-ino Roser CAMPS, de FIGULS el Barcelono kaj Ges-roj EIGENBROD Klas kaj Edith, el Stuttgart. Alia germana paro sin anoncis sed ne venis. Ankaŭ du germanaj junulinoj, kiuj pro maltaŭga dato de studperioda remalfermo rezignis ilian partoprenon.

Profesoro RIBOT gvidis vizitatan kurson de multaj personoj por la tria grado. S-ino AUTHIER gvidis la duan kaj S-ino MOUNIER la unuan. Ĉiuj kursoj okazis per rekta metodo.

Nun tradicia, okazis tre ĝojiga "Brazukado" (Vidu SFS 1981)

Diversaj kaj agrablaj estis la vesperkunvenoj en kies programoj ĉiuj partoprenis, ĉu individue, ĉu grupe.

Gratulojn kaj dankojn al la prizorgantoj : D-ino VIERNE kies bonhumora ĉeesto ĝojigis la ĉeestantaron, S-ro CAPUS kiel kompetenta estro kaj nia juna S-ano F. MAURIN kiel sperta kasisto.

Ankoraŭ ĉi-jare la grupo partoprenis en la grava urba manifestacio de la "Foire aux Associations" sur la promenejo Le Peyrou. Certe sukcese. S-ro LENTAIGNE afable disponigis la materialon al aliaj grupoj.

B E Z I E R S : Ankaŭ tiu vigla grupo partoprenis en la Semajno en SETE. S-anoj AUTHIER kaj TERRAL plezurigis la ĉeestantojn per filmoj kaj teatraĵo : "Hazarda renkonto en publika ĝardeno" adaptita de hispana verko.

Feliĉiga novaĵo el Servian : Naskiĝis Sonia PASSARELLA, unua DENASKA ESPERANTISTINO de nia Regiona Federacio.

Plej korajn bondezirojn al ŝi kaj ŝiaj gepatroj !

N I M E S - A L E S : Kadre de Freinet-Instrua-Movado, I.C.E.M. kongresis en HUNGARIO. Ĉeestis niaj Ge-sanoj Claudine COULOMB kaj G. SCHLUMPF. Ŝajnas ke la uzo de Esperanto progresas en tiu medio.

La departementa grupo partoprenis en la "Foiro de Asocioj", la 9-an k. 10-an de oktobro en Palais des Congrès, NIMES. Kontentigajn Rezultojn !

Lernado de Esperanto okazos denove ĉiun lundon en Kultura Centro Pablo Neruda, de la 16-a ĝis la 19-a horo. Ankaŭ S-ino VOLPELIERE daŭre instruas la 1-an kaj 2-an gradajn lernantojn.

La monata kunveno de la grupo okazos ĉiujn unuajn lundojn je la 18-a h. 1/4. Vizitantoj ĉiam estos bonvenaj.

D-ro Arpád MÁTHE, Redaktoro de "Budapeŝta Informilo", vizitis Montpellier kaj Nimes. Malgraŭ la neĉeesto de ĉi-tiea akceptanto, nia hungara samideano sendis siajn dankaĵojn pro la helpo kiun niaj praktikaj turistaj informoj alportis al li dum lia vojaĝo tra Langvedoko .

A V I G N O N... Sabaton la 6-an kaj Dimanĉon la 7-an de Novembro, nia vaŭkluzo amiko GENTE organizis Staĝon por Komencantoj en "La Barbière". S-ino MOUNIER partoprenis kan juna esperantistino kaj raportis pri la sukceso de tiu ĉiujara okazintaĵo kaj anoncis la "Tagon de Zamenhof" en AIX.

INTERŜANĜOJ :

S-ano LENTAIGNE, 3 Aven. de la Gaillarde, 30000 MONTPELLIER (CCP. 466 99 Montp.) proponas la jenajn :

Ĉu vi deziras helpi la Ĉinan esperantan movadon ? "EL POPOLA ĈINIO" estas preta interŝanĝi "KIEL DIRI ?" kontraŭ libroj eldonitaj de ĝi.

- "Klopodo de simioj por alakvigi la lunon" sekvata de "La imitemo de simioj" (7,20 F)
- "Nezha kirlas la maron" (14,50 F)
- "Pesi elefanton" (18,00 F)
- "Neĝa infano" (8,00 F)
- "Matenaj floroj kolektitaj en la vespero" (5,70 F)
- "Noveloj de LUSIN" (30,00 F)

Se vi mendus 5, 10.... KIEL DIRI ?, vi ĝuos 20% rabaton, do same koncerne la Ĉinajn eldonojn. Minimuma nombro mendotaj : 10 ekzempleroj : 57,60 F

Se la aferon vi juĝas "utila kaj interesa", vi sendu al S-ano LENTAIGNE ĉekon SEN DATO kiun li enkasigos post 3, 4...monatoj, kiam li estos certa, ke la pakoj estas efektive senditaj fare de "EL POPOLA ĈINIO".

S-ano LENTAIGNE esperas, ke ni helpos lin kontribui al la realigo de tiu plano, kaj tutkore dankas.

1983 ANNÉE MONDIALE DES COMMUNICATIONS

Thème de réflexion choisi par l'U.N.E.S.C.O. pour l'année prochaine.


Afin de clarifier le débat à venir, les esperantistes proposent de distinguer quatre notions différentes, mais intimement liées : les moyens, les modes, l'information et la communication. Il faut en effet différencier les moyens d'information ou de communication, c'est à dire les matériels utilisés des modes d'information ou de communication, c'est à dire les langages (oral, gestuel, graphique, etc...). De même, il faut discerner l'information (transmission de données dans un seul sens) de la communication, c'est à dire l'échange d'informations.

COMMUNICATIONS ou COMMUNICATION ?

Il ne s'agit pas d'une simple nuance grammaticale. Au pluriel, on peut être tenter de disserter sur les échanges de voyageurs et de marchandises au-delà des frontières. On peut penser que l'UNESCO n'envisage pas la question sous cet angle, bien qu'il ne soit pas négligeable du point de vue d'un droit de l'Homme fondamental : la liberté d'aller et venir est encore entravée ou même inexistante entre certains pays et même à l'intérieur de ceux-ci.

Il est possible aussi de développer la réflexion sur les moyens d'information. L'alliance prochaine du satellite et de l'antenne individuelle de télévision, par exemple, va bouleverser l'architecture des réseaux qui tentaient de suivre au plus près les frontières nationales. Dans peu d'années, seules les frontières linguistiques entraveront cette information de masse devenue internationale grâce au progrès technique. Mais s'arrêter sur ce thème serait limiter le débat à de vastes exposés sur l'avancement des techniques.

Or l'enjeu réel est plus politique. Il s'agit de faire réfléchir dans tous les pays de notre planète sur la nécessité de favoriser la communication au niveau mondial, de développer ce nouveau droit de l'homme à conquérir : le droit à la communication mondiale. Notre vie dans ses aspects politiques, économiques et sociaux tend de plus en plus à s'internationaliser alors que la communication internationale et donc les échanges culturels restent misérablement atrophiés. On peut acheter japonais sans difficulté dans presque tous les points du globe, mais pas communiquer avec les fabricants et leurs grandes maisons de négoce international. Le consommateur reste muré par la barrière des langues. Les espérantistes, pour surmonter ce défi, proposent de favoriser la vie associative et la communication internationales. La solution concrète : que le consommateur adhère à une association et que cette association puisse agir auprès des fabricants et re-



vendeurs par une action internationale concertée. Mais celle-ci est largement entravée par l'obstacle linguistique.

La communication internationale nécessite l'utilisation d'un mode propre, c'est à dire d'un langage international. De nombreux langages internationaux existent déjà pour la communication entre catégories spécialisées (langage mathématique, visuel, informatique : basic, cobol, fortran..., signalisation routière, gestuel, langage des sourds-muets,...) mais pas de langue internationale reconnue pour les échanges dans tous les domaines de la pensée.

Il existe un palliatif : le multilinguisme. Mais c'est un moyen restreint, coûteux et donc élitiste. Pour se passer d'interprète et ne pas maîtriser l'Esperanto, quatre boulistes de nationalités différentes, jouant cet été, ont réduit leur communication au comptage des points... dans un maigre anglais diffusé à longueur d'année par les chansons de leurs radio et télévision... sous la direction de l'Anglais parfaitement à l'aise dans sa langue maternelle ! Bien sûr si chacun avait connu trois langues, chacun aurait pu parler la sienne et être compris des autres ! Mais ce club aurait été très fermé : réservé aux quatre langues élues et aux privilégiés de l'intellect et de la fortune capables de maîtriser ces quatre langues !

Les Espérantistes, bien sûr, prônent la reconnaissance de leur langue bientôt centenaire comme langue internationale. Elle en a déjà toutes les qualités requises. Seule lui manque la reconnaissance des autorités politiques. Plusieurs pays lui accordent déjà une place semi-officielle (dans l'enseignement public, par exemple), mais pas encore au niveau le plus urgent, au niveau international, à la C.E.E., à l'O.N.U., à l'U.N.E.S.C.O....

Mais quelles sont les qualités requises pour qu'une langue soit reconnue internationale ? DESCARTES citait déjà ces deux : la simplicité et la régularité. L'Esperanto répond à ces deux critères : grammaire sans exception, orthographe phonétique, formation logique des mots, et à quelques autres encore.

Pour l'année 1983 - année mondiale des communications - les espérantistes souhaitent que les responsables des communications établissent la liste des qualités requises d'une langue internationale et vérifient si l'Esperanto les possède bien toutes.

Les Espérantistes ne craignent rien. L'Esperanto favorise déjà - à petite échelle - la communication internationale depuis bientôt 100 ans .

P O E M O : F R U K T O J DE A Ŭ T U N O

Granda elekto en la korbo de aŭtuno
Post lastaj fruktoj de somer', vinber' kaj pruno.
Per juglandoj kaj aveletoj
Rapide pleniĝos niaj belaj korbetoj.

Poste, ruĝaj pomoj sub la dent' krakantaj
Kaj firmaj piroj en la buŝo fandiĝantaj,
Kaj ankaŭ, por ies plezur',
Figo, kaki', kaŝtano kun bruna glazur',
Daktilo el Afrik', mespil' el nia land',
Kaj ekzota frutar', Ĉio por nia frand'.

Bela elekt', profitu ĝin :
Malavaras aŭtun', sed baldaŭ venos fin' .

Marie-Andrée CHAUSTEUR
("Brindilles" - "Ŝoseretoj")

Esperantigis S-ro LAVAL (VALO). Aliaj poemetoj aperos en nia revuo, kiuj montras la talenton de tiu belga poetino, komencanta Esperantistino. Ŝiajn verkojn oni povas aĉeti -franclingve kaj ilustrataj per infanaj desegnoj - ĉe M.A.CHAUSTEUR, Clos des Côtéaux 28, B. 5001 BELGRADE-NAMUR (Belgique). CCP 000-0709837-88. "Tableaux et Portraits" (40 pĝ, illustr. 140 B.F. kaj "Brindilles" (56 pĝ, illustr. 100 B.F.) 100 B.F. = 14,60 F.F.

* PRI TURISMO *



Se turismo signifas viziton de aliaj lokoj aŭ landoj, sufiĉas iri al la plej proksima vojaĝantejo kaj "aĉeti" vojaĝon. Ĝi ne necesas paroli alian lingvon, ĉar akompanantino klarigos al vi la tuton, se vi estos sciemulo.

Se turismo signifas renkonton kun aliaj homoj, aliaj popoloj, tiam Esperanto havas nekompareblan rolon. Bedaŭrinde tio ofte okazas kadre de renkontoj aŭ kongresoj, kaj ne permesas vidi kiel homoj vivas. Ni do profitu la jam ekzistantajn servojn (delegita reto, pasporta servo, tutmonda adresaro) kaj la E-okazantaĵojn por bone "turismi" dumferie. Prefere ni ne "konklavu" kaj ne restu inter E-istoj, se ni deziras pravi al la publiko la praktikan utilecon de nia lingvo.

Se vi posedas veturilon kaj prefere sed ne necese tendon aŭ ruldomon, ni kune povus viziti aliajn landojn, ekzemple en 1983 centran Eŭropon kun eventuala vizito al la U.K. en BUDAPEŬTO. Vizitoj ne estus limigataj al kasteloj kaj katedraloj kaj similaj, sed al konatiĝo kun homoj kaj la lokoj kie ili vivas, laboras sin distras....Kompreneble neniu finanva aliĝo estas parolota kaj eblos partopreni nur kelkajn tagojn, kuniĝi al la grupo kaj lasi ĝin kiam oni tion deziras. Nur necesas scii anticipe kiu partoprenos kiam, por serioze organizi la vojaĝon.

La vizitotaj landoj estos tiuj kie E- estas populara kiel Hungario, sed ankaŭ tiuj kie ĝi ne estas favorata (Britio - Francio) aŭ preskaŭ nekonata (Nord-Afriko).

Por 1983 mi proponas : en Julio, foriron el GRAY (7-5), 1 semajnon en Svisio, 1 en okcidenta Germanio, 1 en Aŭstrio, 1 en Hungario ;

en Aŭgusto : 1 semajnon en Hungario (aŭ U.K. en Budapeŝto), 1 en suda Pollando, 1 en Orienta Germanio, 1 en okcidenta Germanio kaj, la unuan semajnon de Sptembro en orienta Francio (Alzaco).

Pro la bona reto de aŭtovojoj en Germanio estas facile kuniĝi aŭ reveni je iu ajn dato. Detalojn de la vojplano mi volonte diskutos kun interesuloj. Bonvolu anonci la eblecon al viaj korespondantoj.

J. H E N I N

(48500 LA CANOURGUE)

KONTRIBUO pri EVENTUALA VOJAĜO al B U D A P E Ŭ T O

Lastjare, mi projektis partopreni vojaĝon en Hungario, invitita de longtempe de mia amiko Miklós BERÉNYI, ĉefdelegito de U.E.A. en BUDAPEŬTO. (Mi konas lin de 1968, kiam ni vojaĝis kune per aŭto ĝis MADRIDO kie okazis le U.K.) Dum la unua semajno de julio 1981, li -kaj lia edzino- restadis en NIMES. Ni vizitis la regionon kaj li insistis por ke mi, finfine, libertempu en lia bela lando.

Mi kontaktis TOURISME HONGROIS / I.B.U.S.Z., 27, Rue du 4 Septembre, 75002 kiu sendis al mi tre kompletan dokumentaron, inter aliaj mapojn PARIS kaj planojn. Oni ne forgesis la tre detalan sciigon pri la riĉa ebleco pri tendumado. Mi posedas do ĉiujn praktikajn informojn pri formalajoj (Pasporto, vizo, monŝanĝo, benzino, ktp.). Denaska hungarina amikino kiu loĝas en Montpellier -ŝi vojaĝas per trajne inter BASELO k. BUDAPEŬTO- malkonsilis al mi viziti Hungarion dum Aŭgusto pro la varmeco.- Tamen, mi kompletigis mian informon kaj mi legis ke rekta vagonaro foriras Marsejlo, malfruvespere kaj, per italaj fervojoj, atingas Vienon morgaŭmatene; ke la karto "Inter-Rail" valoras por malpli 26-jaraj junuloj; ke dumsomere, oni povas vojaĝi per aŭtofare inter Italio kaj Hungario; ke inter Vieno kaj Budapeŝto, ĉiutaga "hidroptero" (Kompanio Mahart) iras kaj venas sur Danubo inter la du ĉefurboj (duonaprile ĝis finseptembre). La hungara kompanio MALEV - kaj 22 aliaj diverslandaj- unuigas la ĉefurbon al 39 urboj en 22 ŝtatoj. Oni ne precizigis al mi ĉu Marsejlo-Marinjano estas unu el tiuj haltejoj. Kelkaj tagoj poste, mi interrilatis kun "Turismo k. Laboro" kiu organizis aŭtofare vojaĝon - 2 ĝis 13 de Aŭgusto 1982 - (haltejoj en Brescia, Graz, Visegrad, Budapest, Matrahaza, Pecs, Lago Balaton, reiro per Graz, Dolomites, Bergamo, Milan, Pavie k. Gênes). Oni proponis la prezon de 3.625 F. Mi ne registrigis min, ĉar mia amikino Berenyi ne estis en Budapeŝto kie la restado estis mallongedaŭra. Mi libertempis en la kastelo GRESILLON.

H. Jannez

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. - 30000 NIMES

Dépot Légal : 3^{ème} Trimestre 1982

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes